pensis ŝi "ĝis la oreloj aperos, aŭ almenaŭ unu el ili."

Post unu minuto jam aperis la tuta kapo. Alicio demetis sian fenikopteron, kaj komencis doni plenan raporton pri la ludado, ĝojante, ke nun ŝi havas atentan aŭskultanton. La Kato ŝajne opiniis, ke jam estas videbla sufiĉe da lia korpo, kaj li aperigis nenion plu.

"Laŭ mi, oni ludas tre maljuste" diris Alicio per iom plenda voĉo "kaj ĉiuj tiel laŭte malpacas, ke mi ne povas aŭdi mian propran voĉon; oni ne havas definitivajn regulojn, aŭ se ekzistas tiaj, oni ne atentas ilin. Ankaŭ vi ne povas imagi kiel konfuzige estas ke ĉiuj ludiloj — pilkoj, arkoj, k.t.p. estas vivaj. Ekzemple, jen la arko kiun mi devas celi promenas ĉe la alia bordo de la ludejo; kaj ĵus kiam mi volis martelumi la pilkon de la Damo, ĝi forkuris de la mia!"

"Ĉu vi trovas la Damon agrabla?" diris la Kato per mallaŭta voĉo.

"Tute ne" respondis Alicio. "Ŝi ja estas tiel ekstreme—— "

En tiu momento ŝi rimarkis ke la Damo staras malantaŭ ŝi kaj aŭskultas, do ŝi daŭrigis: —— "lerta kaj trafema, ke neniu alia havas eĉ la plej malgrandan venkŝancon."

La Damo ridetis afable kaj preterpasis!

"Kiun ajn vi alparolas?" diris la Reĝo, 



alvenante antaŭ Alicion, kaj rigardante el larĝe malfermitaj okuloj la Katkapon.

"Unu mian amikon" Alicio ĝentile respondis. "Permesu ke mi prezentu al vi —— la *Ĉeŝŝa* Katon."

"Mi tute ne aprobas ĝian aspekton" diris la Reĝo "tamen se al ĝi plaĉos, mi permesos al ĝi kisi mian manon."

"Tio *ne* plaĉas" diris la Kato.

La Reĝo metis sian reĝan korpon por protekto malantaŭ Alicion.

"Vi ne insultu" diris li el tiu rifuĝejo, "kaj —— ne rigardu min."

"La Kato ja *rajtas* rigardi vin"[1] diris Alicio. "Tion mi certe legis en iu libro kvankam mi ne povas rememori la titolon."

"Tamen ĝi devas esti formovita" diris la Reĝo fortemfaze. Kaj alvokinte la Damon, kiu en tiu momento preterpasas, "Mi tre volas" diris li "ke vi, karulino, formovigu tiun katon."

Por forigi ĉiujn malagrablaĵojn, ĉu gravaj, ĉu trivialaj, la Damo ja havis ĉiam la saman rimedon. "Senkapigu ĝin" ŝi diris, eĉ ne turnante la kapon por rigardi.

"Do, mi venigos mem la ekzekutiston" diris la Reĝo, kaj tiucele li tuj rapidis for.

En tiu momento Alicio ekaŭdis la voĉon de la Damo, kiu malproksime kriegas furioze.

[1] "Eĉ Kato rajtas rigardi Reĝon" estas angla popoldiro.